

eLIBRO

*John Ruskin*

La reço  
de la  
Ora rivero

I N K O

*John Ruskin*

**LA RÊGO DE LA ORA RIVERO**

*aŭ La nigraj fratoj*

*Tradukis Ivy Kellermann*

*Laŭ la eldono de Esperanto-Verlag*

*Ellersiek & Borel G.m.b.H.*

*Berlin & Dresden 1926*

*skanis kaj tekstigis Andreo Hîjnjak*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-179-8**

*inko@omnibus.se*

*http://www.omnibus.se/inko*

DECEMBRO 2002

# John Ruskin

John Ruskin naskiĝis en la jaro 1819 en London. Lia patro estis bone instruita kaj sufiĉe riĉa, kaj lia patrino estis tre inteligenta kaj ĉarma virino. Ŝi mem instruis la knabon dum lia frua infaneco, zorgeme aranĝante liajn taskojn, horojn de studado kaj amuzadon. Li havis malmultajn ludilojn kaj ne ofte ludis kun aliaj infanoj, donante la plejparton de sia tempo al legado de elektitaj libroj. Post kelkaj jaroj li komencis akompani la patron, kiu, kiel agento por vinberista firmo, multe vojaĝis. Tio donis al la knabo okazon, vidi belajn pejzaĝojn kaj viziti pitoreskajn kastelojn. La patro montris al li la pentraĵojn en multaj famaj pinakotekoj kaj inspiris al li tian komprenon pri arto, arĥitekturo kaj iliaj rilatoj al la naturo, ke li poste fariĝis fama verkisto pri la arto kaj la naturo.

Inter liaj pli gravaj verkoj estas *Modernaj pentristoj*, en kvin volumoj, *La ŝtonoj de Venecio* kaj *La lumoj de arĥitekturo*; de 1860 ĝis sia morto en 1900 li verkis ankaŭ librojn pri sociologio kaj politika ekonomio.

Li verkis la rakonteton *La reĝo de la Ora rivero* en la jaro 1841, responde al peto de juna knabino kaj nur por ŝia amuzado. Sed iom pli poste, kiam iu amiko sugestis, ke oni presigu ĝin, li ne rifuzis permeson al la eldonistoj.

*Washington, Novembro 1910.*

**Ivy Kellerman**

# Unua ĉapitro

## *Kiel sinjoro Sudokcidenta vento ĝenis la sistemon agrikulturan de la Nigraj fratoj*

**P**ratempe en kaŝita kaj monta parto de Stirio estis mirige kaj abunde produktema valo. Ĝi estis tute ĉirkaŭata de krutaj kaj ŝtonplenaj montoj, leviĝantaj en pintoj, kies altaj suproj estis ĉiam neĝkovrataj. De tiuj malsuprenfalas multaj torentoj en senĉesaj kaskadoj. Unu el ĉi tiuj falis okcidenten, trans la flankon de kru-tegaĵo tiel alta, ke post kiam la suno jam subiris al la cetera mondo kaj kiam ĉie malsupre mallumiĝis, la sunradioj ankoraŭ brilis rekte sur tiun kaskadon tiamaniere, ke ĝi similis oran pluvon. Tial la ĉirkaŭa popolo nomis ĝin la Ora rivero.

Estis rimarkinde, ke neniu el ĉi tiuj riveretoj falis en la valon mem. Ili ĉiuj malsupreniris la alian flankon de la montoj kaj serpentumis tra larĝaj ebenaĵoj kaj preter homplenaj vilaĝoj. Tamen la nuboj estis tiel senĉese altirataj al la neĝkovritaj montoj kaj ripozadis tiel malpeze en la rondforma kavaĵo, ke dum senpluvaj kaj varmegaj periodoj, kiam la tuta ĉirkaŭaĵo estis bruldifektita, anko-

raŭ falis pluvo en la valetto. Ĝiaj rikoltoj estis tiel grandaj, ĝia fojno tiel alta, kaj tiel ruĝaj estis ĝiaj pomoj, tiel bluaj la vinberoj, tiel bongusta la vino kaj tiel dolĉa la mielo, ke ĉiu vidanto estis mirigita, kaj oni kutime nomis ĝin la Valo de trezoro.

La tuta valetto apartenis al tri fratoj, nomitaj Schwartz, Hans kaj Gluck. Schwartz kaj Hans, la pli maljunaj fratoj, estis tre malbelaj viroj kun pendantaj brovoj kaj malgrandaj malhelaj okuloj, kiuj ĉiam estis duonfermitaj tiamaniere, ke oni ne povis envidi en ilin.

Pro vivrimedoj la fratoj kulturis la Valon de trezoro, kaj bonegaj terkulturistoj ili ja estis. Ili mortigis ĉion, kio ne pagis por sia nutraĵo: ili mortpafis la merlojn pro bek-pikado de la fruktoj, kaj mortigis la erinacojn, por ke ili ne suĉu la bovinojn; ili venenis la grilojn, ĉar tiuj manĝis la panpecetojn en la kuirejo, kaj sufokis la cikadojn, kiuj kantadis la tutan someron sur la tilioj. Ili laborigis siajn servistojn sen salajro, ĝis la servistoj rifuzis plu labori, kaj tiam la fratoj malpaciis kun ili kaj forpelis ilin de la domo sen pago.

Estus surprize, se, havante tian farmbienon kaj tian sistemon, ili ne estus fariĝintaj tre riĉaj; kaj tre riĉaj ili ja fariĝis. Ili kutime sukcesis rezervi sian grenon, ĝis kiam ĝi estis tre multekosta, tiam ili vendis ĝin por la duoblo de ĝia valoro. Ili havis amasojn da oro kuŝantajn ĉirkaŭe sur la planko, tamen oni neniam sciiĝis, ke ili iam dona-

cis eĉ pencon aŭ panpeceton kiel almozon. Neniam ili ĉeestis meson, kaj ili grumblis senĉese pri pagado de imposto. Unuvorte, ili estis tiel kruelaj kaj tiranaj, ke ĉiu, kun kiu ili havis rilatojn, nomis ilin la "Nigraj fratoj."

Gluck, la plej juna frato, estis laŭ mieno kaj karaktero tiel malsimila al la pli aĝaj fratoj, kiel oni povus eble imagi aŭ deziri. Li ne havis pli ol dek du jarojn, estis blondhara, bluokula kaj bonkora al ĉiu vivanta estaĵo.

Kompreneble li ne vivis tre bonkonsente kun siaj fratoj, aŭ, pli vere, ili ne vivis bonkonsente kun li. Kutime li devis deĵori je la honora ofico de rostaĵoturnanto, kiam estis io por rosti, kvankam tio ne ofte okazis; ĉar (por paroli juste pri la fratoj), ili estis apenaŭ malpli ŝparemaj koncerne sin mem ol koncerne aliajn personojn. La ceteran tempon li purigadis la ŝuojn, plankojn kaj kelkfoje la telerojn, okaze ricevante la manĝorestaĵon kiel kuragiĝon, kaj multegon da severaj batoj, kiel kvazaŭan instruadon.

Tiamaniere la aferoj longtempe daŭris. Fine alvenis tre malseka somero, kaj ĉio en la regiono malprosperis. Apenaŭ la fojno estis rikoltita, kiam superakvado naĝigis la tutajn fojnamasojn al la maro; la hajlo pecetigis la vinberujojn; nigra ustilago mortigis ĉiom de la greno. Nur en la Valo de trezoro ĉio prosperis kiel kutime. Tiu havis pluvon, kiam ne estis pluvo aliloke, kaj havis sunradiojn, kiam aliloke la suno ne brilis. Ĉiuj venis al la bie-

no por aĉeti grenon kaj foriris, malbenegante la Nigrajn fratojn, kiuj postulis tiom, kiom ili volis kaj sukcesis ricevi, escepte de malriĉuloj, kiuj povis nur almozpeti. Kelkaj el ĉi tiuj, tute ne rigardate nek helpate de la fratoj, mortis pro malsato ĉe ties propra pordo.

La vintro alproksimiĝis, kaj la vetero estis tre malvarma, kiam iun tagon la du pli maljunaj fratoj eliris, doninte la kutiman admonon al la eta Gluck (postlasita por prizorgi la rostaĵon), ke li enlasu neniun kaj fordonu neniun.

Gluck sidiĝis tre proksime de la fajro, ĉar pluvegis kaj la muroj de la kuirejo tute ne estis sekaj aŭ komfortaspektaj. Li senhalte turnis la viandrostilon, kaj la rostaĵo fariĝis bonguste bruna. "Kiel domaĝe!" pensis Gluck, "ke miaj fratoj neniam invitas iun por kunmanĝi. Mi estas certa, ke kiam ili havas tiel bonan pecon da ŝafaĵo kiel ĉi tiun kaj neniu alia havas eĉ pecon da seka pano, tio feliĉigus iliajn korojn, gastigi iun ĉe la tablo."

Ĝuste kiam li parolis, eksonis duobla frapo sur la pordo, tamen peza kaj malklara, kvazaŭ la frapilo estus bandagita, — pli simila al ventbloveto ol vera frapo.

"Nepre estas la vento," diris Gluck, "neniu alia kuraĝus frapi duoble je nia pordo."

Ne, tio ne estis la vento; denove sonis tre laŭte, kaj, tiom pli mirige, la frapanto ŝajnis malpacienca kaj tute ne timema pri la rezulto. Gluck iris al la fenestro, mal-



fermis ĝin kaj elmetis sian kapon por sciiĝi, kiu estas tie. Ekstere staris la plej rimarkinda sinjoreto, kiun la knabo iam en la vivo vidis. Li havis grandegan nazon iomete brazkoloran; liaj tre rondaj kaj tre ruĝaj vangoj kvazaŭ sugestis, ke li ĵus blovis nebruleman fajron dum kvardek ok horoj; liaj okuloj gaje briletis tra longaj silkecaj okulharoj, liaj lipharoj faris duoblan buklon, simile al korktirilo, ambaŭflanke de la buŝo, kaj liaj haroj, kies koloro similis pipron miksiton kun salo, estis multe pli longaj ol ĝis la ŝultroj,

Li estis alta proksimume unu metron kaj trionon kaj portis preskaŭ tiel altan kasketon, ornamitan per nigra plumo proksimume unu metron longa. Lia korpovesto plilongiĝis malantaŭe kvazaŭ ekstrema trograndiĝo de tia vesto, kian oni nun nomas jako, sed ĝi estis multe kaŝata de la ŝvelantaj faldoj de grandega, nigra, glatbrila mantelo, kiu dum kvieta vetero sendube estis multe tro longa, ĉar la vento, fajfante ĉirkaŭ la malnova domo, etendis ĝin horizontale de liaj ŝultroj ĝis proksimume la kvaroblo de lia persona alteco.

La stranga eksteriĝo de lia vizitanto tiel mirigis Gluckon, ke li staris senmove, ne dirante vorton, ĝis kiam la maljunulo, farinte alian kaj pli energian koncerton per la frapilo, turniĝis por zorgi pri la forflugema mantelo. Tiam li ekvidis la malgrandan flavan kapon de Gluck,

kun larĝe malfermitaj buŝo kaj okuloj, enprematan en la fenestron.

”Ho!” diris la sinjoreto, ”tio ne estas konvena maniero por malfermi la pordon; mi estas malseka, enlasu min.”

Efektive li estis malseka. Lia plumfasko pendis malsupren inter liaj kruroj kvazaŭ vosto de batita hundido, kaj de ĝi gutetis akvo kiel de ombrelo. La akvo enfluis laŭ la pintoj de liaj lipharoj en la veŝtopoŝojn kaj elfluis simile al muelrivereto.

”Mi petas pardonon, sinjoro,” diris Gluck, ”mi tre bedaŭras, sed efektive mi ne povas.”

”Kion vi ne povas?” demandis la maljuna sinjoro.

”Mi ne povas enlasi vin, sinjoro, mi ja ne povas; miaj fratoj mortbatus min, sinjoro, se mi eĉ ekpensus pri tia ago. Kion vi deziras, sinjoro?”

”Kion mi deziras?” diris la maljunuleto kolerete, ”mi deziras fajron kaj ŝirmejon; kaj jen via granda fajro flamas, krakas kaj dancas kontraŭ la muroj, kaj neniu profitas de la varmeco. Enlasu min, mi diras; mi volas nur varmiĝi.”

Teninte la kapon tiel longtempe ekster la fenestro, Gluck eksentis, ke estis ja malagrabla malvarme, kaj kiam li turniĝis kaj vidis la belan fajron, kiu kraketis, muĝis kaj suprenĵetis brilajn fajrostrekojn tra la kamen-tubo, kvazaŭ pro la bonega odoro de la ŝafaĵo, jam pense

ĝin gustumante, la senutila forbrulado de la fajro lin kortuŝis.

”Li efektive ŝajnas treege malseka,” diris eta Gluck. ”Mi enlasos lin nur kvaronon da horo.” Irinte al la por-do, li malfermis ĝin; kaj ĝuste kiam la sinjoreto enpaŝis, ekblovis tra la domo ventego, kiu ŝanceligis la malno-vajn kamentubojn.

”Vi estas bona knabo,” diris la sinjoreto, ”ne ĝenu vin pro la fratoj. Mi parolos al ili.”

”Mi petegas, sinjoro, ne faru tion,” respondis Gluck, ”mi ne povas permesi, ke vi restu ĝis ilia reveno; ili cer-te mortigus min.”

”Ho ve!” diris la maljunulo, ”mi tre bedaŭras tion. Kiom da tempo estas permesate, ke mi restu?”

”Nur ĝis kiam la ŝafaĵo estos rostita, sinjoro,” respon-dis Gluck, ”kaj ĝi jam estas tre bruna.”

Tiam la malgranda sinjoro enmarŝis en la kuirejon kaj sidiĝis sur la pototenilo, trovante lokon en la kamentu-bo por sia kasketo, kiu estis multe pli alta ol ĝis la pla-fono.

”Vi baldaŭ sekiĝos tie, sinjoro,” diris Gluck, ree sidi-ĝinte por turnigi la ŝafaĵon. Tamen la maljuna sinjoro tute ne sekiĝis, sed senĉese la akvo gutetis de li sur la cindrojn, dum la fajro siblis, muĝetis kaj komencis fariĝi tre nigra kaj malagraba. Neniam ekzistis tia mantelo; el ĉiu faldo la akvo fluis kvazaŭ tra defluilo.

”Bonvolu pardoni min, sinjoro,” fine diris Gluck, rigardinte dum kvarono da horo la akvon etendiĝanta per longaj hidrargosimilaj riveretoj sur la planko. ”Ĉu vi permesos, ke mi prenu vian mantelon?”

”Ne, mi dankas vin,” diris la maljuna sinjoro.

”Ĉu ankaŭ ne vian kasketon, sinjoro?”

”Estas al mi komforte, mi dankas vin,” diris la maljunulo iom malafable.

”Sed — sinjoro — mi tre bedaŭras,” diris Gluck hezitante, ”sed — vere, sinjoro, — vi estingas la fajron.”

”Pli longa tempo estos do necesa por kuir la ŝafaĵon,” iom sarkasme respondis la vizitanto.

La konduto de lia gasto tre konfuzis Gluck-on; ĝi estis stranga mikso de trankvileco kaj humileco. Meditante li turnigis la rostaĵon dum kvin pluaj minutoj.

”Tiu ŝafaĵo ŝajnas tre bona,” diris la malgranda sinjoro post iom da tempo. ”Ĉu vi eble povas doni al mi malgrandan peceton?”

”Neeble, sinjoro,” respondis Gluck.

”Mi tre malsatas,” daŭrigis la maljuna sinjoro, ”mi havis nenion por manĝi hieraŭ nek hodiaŭ. Ili certe ne povus rimarki mankon de peco apud la genuo.”

Li parolis tiel melankolie, ke li tute kortuŝis Gluck-on. ”Ili promesis, ke mi ricevos hodiaŭ unu detranĉaĵon, sinjoro,” li diris, ”mi povas tiom doni al vi, sed neniom pli.”

”Bona knabo,” ree diris la maljuna sinjoro.

Tiam Gluck varmigis teleron kaj akriĝis tranĉilon. "Estas ja indiferente al mi, se mi ricevos batadon pro tio," li pensis.

Ĝuste kiam li tranĉis grandan pecon el la ŝafaĵo, sonis ĉe la pordo terura frapo. La maljuna sinjoro desaltis de la pototenilo, kvazaŭ ĝi subite ĝene varmiĝis. Gluck remetis la detranĉaĵon en la ŝafaĵon kun senesperaj penoj je precizeco kaj poste kuris por malfermi la pordon.

"Kial vi atendigis nin en la pluvo?" diris Schwartz, enpaŝante kaj ĵetante sian ombrelon al la vizaĝo de Gluck. "Jes! Kial do, kanajleto?" ekkriis Hans, donante al li instrueman orelfrapon, dum li sekvis la fraton en la kuirejon.

"Dio mia!" ekkriis Schwartz, malferminte la pordon.

"Amen," diris la sinjoreto, kiu, forpreninte la kasketon, staris meze de la kuirejo, fleksiĝante kiel eble plej rapide.

"Kiu estas tiu?" demandis Schwartz, ekprenante pastoplatigilon kaj turniĝante a! Gluck kun sovaĝa malrideto.

"Mi ja ne scias, frato," diris Gluck tre timigita.

"Kiel li eniris?" kriegis Schwartz.

"Mia kara frato," humile protestis Gluck. "Li estis tiel terure malseka."

La platigilo estis ĵus fraponta la kapon de Gluck, kiam la sinjoreto tuj intermetis la konusforman kasketon, sur

kiu krakegis la platigilo, elskuante la akvon el la kasketo ĉien en la ĉambro. Sed strange ja estis, ke la platigilo, ektuŝante la kasketon, tuj elflugis el la mano de Schwartz, turniĝante kvazaŭ pajlo en forta vento, kaj falis en angulon ĉe la pli malproksima flanko de la ĉambro.

”Kiu estas vi?” demandis Schwartz, turnante sin al li.

”Kion vi faras ĉi tie?” boje blekis Hans.

”Mi estas kompatinda maljunulo, sinjoro,” la sinjoreto ekdiris tre modeste, ”kaj vidante vian fajron tra la fenestro, mi petis kvaronhoran ŝirmadon.”

”Bonvolu tuj elmarŝi,” diris Schwartz. ”Ni jam havas sufiĉe da akvo en nia kuirejo, ne farante el ĝi sekigejon.”

”Estas malvarma vetero por forĵeti maljunulon, sinjoro; rigardu miajn grizajn harojn.” Ĉi tiuj pendis ĝis liaj ŝultroj, kiel mi antaŭe rakontis.

”Ho, jes!” diris Hans, ”estas sufiĉe da ili por varmigi lin. Eliru!”

”Mi estas treege malsata, sinjoro. Ĉu vi ne povus doni al mi pecon da pano antaŭ mia foriro?”

”Panon! Kia ideo!” ekkriis Schwartz. ”Ĉu vi supozas, ke neniel alie ni uzas nian panon, ol por doni ĝin al tiaj ruĝnazaj kanajloj?”

”Kial vi ne vendas vian plumfaskon?” mokis Hans. ”Eliru!”

”Malgrandan pecon mi petegas,” diris la maljuna viro.

”For de ĉi tie!” ordonis Schwartz.

”Mi petegas, sinjoro.”

”For, kaj estu pendigota!” ekkriis Hans, ekkaptante lin je la kolumo. Sed tuj kiam li tuŝis la kolumon de la sinjoreto, Hans sekvis la platigilon, turniĝante ree kaj ree kaj fine falante sur la platigilon en la angulo. Tiam Schwartz tre koleriĝis kaj kuris al la maljunulo por elĵeti lin; sed ankaŭ li apenaŭ tuŝis lin, kiam li perforte sekvis la fraton kaj la platigilon, frapante la kapon kontraŭ la muro, kaj li falegis en la angulon. Tie do kuŝis ĉiuj tri.

Poste la maljuna sinjoro rapidege turnis sin laŭ la kontraŭa flanko; li turniĝadis, ĝis kiam la longa mantelo tute volviĝis ĉirkaŭ li. Sur la kapon li ekmetis la kasketon, tre oblikve, ĉar alie ĝi traborus la plafonon, donis alian tordon al la spiralbuklaj lipharoj kaj diris tute trankvile: ”Sinjoroj, mi deziras al vi tre bonan matenon. Je la dekdua nokte mi ree vizitos vin; post tia rifuzo de gastigado, kian mi ĵus spertis, vi ne miros, se tiu vizito estos la lasta, kiun mi iam faros al vi.”

”Se iam mi ree vin trovos ĉi tie,” grumblis Schwartz, venante duone timigita el la angulo — sed, antaŭ ol li povis fini la frazon, la maljuna sinjoro eliris, fermante la pordon kun granda ekbruo; kaj preter la fenestro en tiu momento flugis girlando el ĉifonita nuboj, kiu kirliĝis kaj

ruliĝis laŭlonge de la valo en ĉiaj formoj, turniĝante en la aero kaj fine fluidiĝante en subita pluvo.

”Tre bela afero estas tio, sinjoro Gluck!” diris Schwartz. ”Metu la ŝafaĵon sur teleron! Se iam mi ree trovos vin faranta tian friponaĵon — Dio mia! La ŝafaĵo estas jam tranĉita!”

”Vi promesis al mi unu detranĉaĵon, frato, ĉu ne?” diris Gluck.

”Ho! ho! kaj vi tranĉis ĝin, dum ĝi estis varmega, mi vidas, intencante kapti ĉiom de la saŭco. Pasos longa tempo, antaŭ ol mi ree promesos al vi ion similan! Eliru el la ĉambro, kanajlo, kaj restu en la karbokelo, ĝis kiam mi vokos vin.”

Gluck eliris el la ĉambro sufiĉe melankolie. La fratoj manĝis kiel eble plej multe de la ŝafaĵo, enŝlosis la restaĵon en la ŝrankon kaj post la manĝo komencis ebriiĝi.

Kia terura nokto! Muĝega vento kaj torenta senĉesa pluvo! La fratoj ankoraŭ retenis sufiĉe da prudento por fermi ĉiun fenestran kovrilon kaj duoble rigli la pordon, antaŭ ol ili enlitiĝis. Kutime ambaŭ dormis en unu ĉambro. Ĝuste kiam la horloĝo batis la dekduan, ilin vekis timiga krakego: la pordo krevis kun fortego, kiu skuis la domon de supro ĝis fundo.

”Kio estas tio?” ekkriis Schwartz, eksaltante en sia lito.

”Nur mi,” diris la sinjoreto.



La du fratoj sidiĝis sur la kapkusenoj kaj fikse rigardis en la mallumon. La ĉambroj estis plenaj de akvo, kaj per nebuleta lunradio, kiu trovis sian vojon tra truo en la fenestra kovrilo, ili povis vidi meze de la akvo grandegan ŝaŭmosferon, turniĝantan kaj dancantan supren-mal-supren simile al korko; kaj sur la sfero, kvazaŭ sur plej luksa kuseno, kuŝis la maljuna sinjoreto kun kasketo kaj ĉio cetera. Estis nun sufiĉe da loko por la kasketo, ĉar la tegmento ne plu restis sur la domo.

”Mi bedaŭras vin ĝeni!” ironie diris la vizitanto. ”Mi timas, ke viaj litoj estas iomete malsekaj; eble estus pli bone, se vi irus al la ĉambro de via frato. Mi lasis la plafonon tie.”

Ili ne atendis admonon, sed rapidis tute malsekaj kaj en grandega teruro en la ĉambro de Gluck.

”Vi trovos mian vizitkarton sur la kuireja tablo,” la maljuna sinjoro kriis post ili. ”Memoru, ĉi tiu estas la lasta vizito.”

”Ĉielo permesu tion!” diris Schwartz, tremante. Kaj la ŝaŭmsfero malaperis.

Taglumo fine venis, kaj matene la fratoj elrigardis el la malgranda fenestro de la ĉambro de Gluck. En la tuta Valo de trezoro montriĝis nur ruino kaj pereco. La super-akvado estis forbalainta arbojn, rikoltojn kaj brutarojn kaj lasis anstataŭe dezerton plenan de ruĝa sablo kaj griza koto.

La du fratoj iris tremante kaj timigite en la kuirejon. La akvo estis tute difektinta la teretaĝon. Grenon, monon, preskaŭ ĉiun moveblaĵon ĝi estis forportinta, kaj restis nur malgranda blanka karto sur la kuireja tablo. Sur tiu estis gravuritaj per grandaj kurbaj longkruraj literoj la vortoj: sinjoro Sudokcidenta vento.

## Dua ĉapitro

*Pri la agoj de la Nigraj fratoj post la vizito de sinjoro Sudokcidenta vento; kaj kiel eta Gluck havis interparoladon kun la reĝo de la Ora rivero.*

**S**injoro Sudokcidenta vento tiel agis, kiel li promesis. Post la ĵus rakontita grava vizito li ne plu eniris la Valon de trezoro; kaj, pli domaĝe, li havis sufiĉan influon je siaj parencoj, la ceteraj okcidentaj ventoj, kaj tiel forte ĝin uzis, ke ili ĉiuj simile kondukis. Tial de la komenco ĝis la fino de la jaro ne pluvis en la valo.

Kvankam ĉio malsupre sur la ebenaĵoj restis verda kaj floranta, la bieno de la tri fratoj fariĝis dezerto. Tiu tero, antaŭe la plej riĉa en la regno, fariĝis amaso de ĉiam moviĝanta ruĝa sablo. La fratoj, ne plu povante kontraŭstari la tre malfavorajn elementojn, forlasis malespere sian senutilan heredaĵon por trovi alian vivrimedon meze de la urboj kaj homoj sur la ebenaĵo. Ili havis neniom plu da mono; kaj restis al ili nenio krom kelke da kuriozaj nemodernaj oraj teleroj, — lasta restaĵo de malbone akirita riĉaĵo.

”Ni fariĝu oraĵistoj, ĉu ne?” diris Schwartz al Hans, kiam ili eniris la grandan urbon. ”Tio estas bona metio por ruzuloj. Ni povos enmeti en la oron multe da kupro, kaj neniu ekscios pri tio.”

Konsentante, ke la ideo estas bona, ili luis fornon kaj fariĝis oraĵistoj. Tamen du cirkonstancoj malhelpis ilian komercon: unue, oni ne aprobis la kupritan oron; due, kiam ajn la du fratoj vendis ion, ili kutime iris en apudan bierejon por fortrinki la monon, lasante etan Gluck por zorgi pri la fanda forno.

Tiamaniere ili fandis sian tutan oron, ne gajnante sufiĉan monon por aĉeti plion, kaj fine ili havis nur unu grandan pokalon, kiun donis al eta Gluck lia onklo, kaj kiun li alte ŝatis kaj tute ne deziris fordoni, kvankam li trinkis el ĝi nenion escepte lakton kun akvo.

La pokalo havis tre strangan aspekton. Ĝian tenilon formis du girlandoj el ondosiĉa ora hararo, tiel delikate ŝpinita, ke ĝi pli similis silkon ol metalon. Tiuj girlandoj malsupre enmiksiĝis kun barbo kaj vangharoj same rave ellaboritaj, kiuj ĉirkaŭis kaj ornamis sovaĝan malgrandan vizaĝon el la plej ruĝa oro, ĝuste je la antaŭo de la pokalo, kies tutan perimetron la okuloj kvazaŭe rigardadis.

Estis neeble trinki el la pokalo, se oni ne volis toleri fiksan rigardon el la angulo de tiuj okuloj. Schwartz eĉ

certigis, ke iam, kiam li eltrinkis dekduan fojon la rejnvinon, kiu ĝin plenigis, li vidis la okulojn palpebrumi.

Kiam oni pretiĝis por aliformigi ankaŭ la pokalon en kulerojn, la koro de Gluck duone rompiĝis; sed la fratoj nur ridis pri li, ĵetis la pokalon en la fandopoton kaj ŝanceliĝe formarsi al la bierejo, lasante lin kiel kutime por elverŝi la oron en modelilojn, kiam estos ĝustatempe.

Post ilia foriro Gluck ĵetis adiaŭan rigardon al sia malnova amiko en la fandopoto. La ondosimila hararo jam malaperis; nenio restis krom la ruĝa nazo kaj brilaj okuloj, kiuj ŝajnis pli ol ordinare malicaj.

”Kompreneble,” pensis Gluck, ”post tia malbonuzo!” Irinte malgaĝe al la fenestro, li sidiĝis por senti la freŝan vesperan aeron kaj por eviti la varmegan elspiron de la forno.

Nu, tra la fenestro oni povis rekte vidi, kiel mi antaŭe diris, la montaron, kiu ĉirkaŭis la Valon de trezoro, kaj ankoraŭ pli klare oni povis vidi la montopinton, de kiu falis la Ora rivero.

Estis ĝuste tagfinaĵo, kaj kiam Gluck sidiĝis ĉe la fenestro, li vidis la rokojn de la montosupraĵo tute ruĝaj kaj purpuraj pro la sunsubiro. Super ili brilis kaj tremetis helaj langoj el fajra nuboj, kaj la rivero, pli hela ol ĉiuj ĉi, falis de unu krutegaĵo al alia kvazaŭ balancanta kolono simila al pura oro. Trans ĝi etendiĝis duobla arkaĵo de

larĝa purpura ĉielarko, alterne ekruĝiĝante kaj paliĝante en girlandoj el ŝprucaĵo.

”Ho!” diris Gluck al si, rigardinte ĝin iom da tempo, ”se tiu rivero estus vere tute ora, kiel bonege estus!”

”Ne, Gluck, ne estus bone,” diris klara metalsimila voĉo proksime de lia orelo.

”Dio mia, kio estas tio?” ekkriis Gluck eksaltante.

Neniu ĉeestis. Li ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, kaj sub la tablo, kaj multfoje malantaŭ si, sed ja estis neniu tie; kaj ree li sidiĝis ĉe la fenestro. Ĉi tiun fojon li ne parolis, sed li ne povis sin deteni de la penso, ke estus tre oportune, se la rivero vere estus tute ora.

”Tute ne, mia knabo,” diris la sama voĉo pli laŭte ol antaŭe.

”Dio mia!” ree diris Gluck, ”kio povas esti?”

Ankoraŭfoje li rigardis en ĉiun angulon kaj ŝrankon kaj ree sin turnis kiel eble plej rapide, meze de la ĉambro, opiniante, ke estas iu malantaŭ li, kiam li subite ek-aŭdis la saman voĉon. Ĝi nun kantis tre gaje ”Lala-lira-la”; neniun vorton, nur dolĉan sibletan kvazaŭbolantan melodion, iomete similan al tiu de forta bolado en kaldrono.

Gluck rigardis el la fenestro. Ne, la kanto certe estis en la domo. Li serĉis en la supra etaĝo, en la malsupra. Ne, ĝi sendube estis en tiu ĉambro mem, venante pli rapide kaj pli klare ĉiumomente, ”Lala-lira-la.”

Subite Gluck imagis, ke ĝi sonas pli laŭte apud la forno. Li kuris al ĝia pordeto kaj enrigardis. Jes, li estis prava, la kantado ŝajne venis ne nur el la forno, sed el la poto mem. Li malkovris ĝin kaj tuj kuris malantaŭen trege timigita, ĉar la poto certe estis kantanta! Gluck staris unu aŭ du minutojn en la plej malproksima angulo de la ĉambro, kun la manoj levitaj kaj la buŝo malfermita, kiam la kantado ĉesis, kaj la voĉo fariĝis klara kaj parolanta.

”He! ho!” diris la voĉo.

Gluck ne respondis.

”He! Gluck, knabo mia,” ree diris la poto.

Gluck kiel eble plej multe sin ekregis, kaj paŝinte rekte al la fandopoto, li eltiris ĝin el la forno kaj enrigardis. La oro estis tute fandita, kun supraĵo tiel glata kaj polurita kiel rivero; sed anstataŭ sia propra reflektajo, kiam li enrigardis, Gluck vidis sub la oro la ruĝan nazon kaj akrajn okulojn de sia malnova amiko ĉe la pokalo, milfoje pli ruĝan kaj akrajn ol iam antaŭe.

”Venu, Gluck, knabo mia,” ree diris la voĉo el la poto, ”mi estas bonstata, elverŝu min.”

Sed Gluck estis tro mirigita por fari tion.

”Elverŝu min, mi diras,” ripetis la voĉo, iomete malfable.

Gluck ankoraŭ ne povis ekmoviĝi.

”Ĉu vi elverŝos min?” pasie diris la voĉo, ”al mi estas tro varmege.”

Per granda peno Gluck reakiris la uzadon de siaj membroj, ekprenis la fandujon kaj klinis ĝin por elverŝi la oron. Sed, anstataŭ fluida oro, unue elvenis paro da beletaj flavaj malgrandaj kruroj, due kelkaj baskoj, poste paro da brakoj metitaj sur la koksoj, kaj fine la bone konata kapo de lia amiko sur la pokalo. Ĉiuj ĉi, unuiĝante tuj post la elruliĝado, staris energie sur la planko en formo de malgranda ora nano proksimume duonmetron alta.

”Prave!” diris la nano, etendante la krurojn kaj poste la brakojn, tiam skuante kaj kiel eble plej multe balancante la kapon dum kvin minutoj seninterrompe, verŝajne por konstati, ke li estas tute korekte kunmetita. Dume Gluck staris rigardante lin kun muta mirego.

La nano portis korpoveston el ŝpinita oro tiel delikate teksitan, ke la prismaj koloroj lumetis sur ĝi kiel sur la eksteraĵo de perlamoto; kaj laŭ tiu brilega korpovesto liaj haroj kaj barbo etendiĝis almenaŭ duone ĝis la tero en ondaj bukloj tiel rave delikataj, ke Gluck apenaŭ povis rimarki, kie ili finiĝis, ĉar ili verŝajne aeriĝis. La trajtoj de la vizaĝo tamen tute ne estis tiel bele perfektigitaj; ili estis iom maldelikataj, iomete kuprokoloraj, montrante per la esprimo tre persisteman kaj obstinan karakteron ĉe ilia malgranda posedanto.



Kiam la nano finis tiun sinekzamenon, li turnis la malgrandajn akrajn okulojn rekte al Gluck kaj lin fikse rigardis unu aŭ du minutojn. "Ne Gluck, knabo mia, tio ne estus bona," diris la malgranda viro.

Tio estis certe iom abrupta maniero por komenci konversacion. Oni povis ja supozii, ke ĝi aludas al tiuj pensoj de Gluck, kiuj unue eligis el la poto la parolojn de la nano; tamen, kion ajn ĝi signifis, Gluck ne havis deziron kontraŭstari.

"Ĉu efektive ne, sinjoro?" diris Gluck, plej milde kaj humile.

"Ne," diris la nano decideme. "Tute ne." Kaj, dirinte tion, li tiris la ĉapon tute sur la brovojn, marŝis proksimume metron dufoje tien kaj reen en la ĉambro, tre alte levante la kruojn kaj tre forte frapante la plankon per la piedoj. Tiu paŭzo donis al Gluck tempon por iomete ordigi la pensojn; kaj ne havante iun gravan kaŭzon por timi la malgrandan vizitanton, kaj sentante scivolon pli fortan ol miregon, li kuraĝis ekfari demandon speciale intiman.

"Mi petas, sinjoro," diris Gluck, iomete hezitante, "ĉu vi estis mia pokalo?"

Aŭdinte tion, la sinjoreto rapide turniĝis, paŝis rekte al Gluck kaj suprentiris sin ĝis la tuta alteco. "Mi," diris la eta viro, "estas la reĝo de la Ora rivero."

Post tio li ree turniĝis kaj alifoje marŝis tien kaj reen proksimume du metrojn, por doni tempon sufiĉan, por ke la konsterno, kiun ĉi tiu sciigo kaŭzis al lia aŭdanto, povu foriĝi. Tiam, ree paŝinte al Gluck, li staris senmove, kvazaŭ atendente iun respondon pri sia komunikaĵo.

Gluck decidis diri almenaŭ ion. "Mi esperas, ke via reĝa moŝto fartas tre bone," li diris.

"Aŭskultu!" komencis la malgranda viro, neniel respondante al la ĝentila demando. "Mi estas la reĝo de tio, kion vi mortemuloj nomas la Ora rivero. La malico de pli potenca reĝo, el kies sorĉado vi ĵus liberigis min, kaŭzis la formon, en kiu vi antaŭe min vidis. Tiom de via karaktero, kiom mi vidis, kaj via konduto kontraŭ viaj malbonegaj fratoj, dezirigis min helpi al vi; tial aŭskultu tion, kion mi rakontos.

Kiu ajn, suprenrampinte ĝis la supraĵo de tiu monto, el kiu vi vidas la Oran riveron elfluanta, ĵetos en la riverfonton tri gutojn da sankta akvo, — por tiu, kaj por tiu nur, la rivero fariĝos oro. Sed neniu, kiu malsukcesos je la unua provo, sukcesos je dua provo; kaj se oni ĵetos malsanktan akvon en la riveron, ĝi subpremos lin, kaj li fariĝos nigra ŝtono."

Tiel dirinte, la reĝo de la Ora rivero forturniĝis kaj intence marŝis en la plej varmegan flamon de la forno. Lia figuro fariĝis ruĝa, blanka, travidebla, blindiga, — fla-

ma brulado de intensa lumo, —leviĝis, tremis —kaj malaperis. La reĝo de la Ora rivero estis forvaporiginta.

”Ho!” ekkriis la kompatinda Gluck, kurante por postrigardi lin tra la kamentubo. ”Ho ve, ve, ve! Mia pokalo! Mia pokalo! Mia pokalo!”

## Tria ĉapitro

*Kiel sinjoro Hans ekiris por vojaĝo al la Ora rivero, kaj kiamaniere li sukcesis.*

La reĝo de la Ora rivero apenaŭ finis la eksterordinaran eliron rakontitan en la antaŭa ĉapitro, kiam Hans kaj Schwartz venis kriegante en la domon, sovaĝe ebriaj. La sciigo pri la tuta perdo de ilia lasta oraĵo sobriĝis ilin nur sufiĉe por povi stari kontraŭ Gluck kaj bati lin senĉese dum kvarono da horo! Fine ili falis en seĝojn kaj demandis, kion li povas senkulpigi sin.

Gluck rakontis al ili la okazintaĵon, pri kiu kompreneble ili tute ne kredis ion. Ree batinte lin, ĝis kiam iliaj brakoj doloris, ili ŝanceliĝe iris por kuŝiĝi. Dum la mateno tamen la firmeco, kun kiu Gluck insistis pri sia rakonto, akiris por li iom da kredo; la tuja rezulto estis, ke la du fratoj, longe disputinte pri la malfacila problemo, kiu el ili unue provu la sorton, eliris siajn glavojn kaj komencis batali. La bruo timigis la najbarojn, kiuj, tute ne povante pacigi la batalantojn, venigis policanon.

Aŭdante pri tio, Hans sukcesis forkuri kaj sin kaŝis; sed oni perforte kondukis Schwartz-on antaŭ la magi-

straton, kiu monpunis lin pro pacorompo, kaj oni ĵetis lin en malliberejon, ĝis kiam li pagos la punmonon, ĉar dum la hieraŭa vespero li elspezis sian lastan pencon.

Kiam Hans eksciis pri tio, li tre ĝojis kaj decidis tuj ekiri al la Ora rivero. Kiamaniere akiri la sanktan akvon, estis ia problemo. Li iris al pastro, sed tiu povis doni neniom da sankta akvo al tia diboĉulo. Tial Hans iris la unuan fojon en sia vivo al vespera Diservo kaj, pretekstante fari la krucosignon, ŝtelis tasplenon kaj triumfe reiris hejmen.

La sekvantan matenon li ellitiĝis antaŭ la sunleviĝo, verŝis la sanktan akvon en dikan botelon, metis du botelojn da vino kaj iom da viando en korbon, pendigis ilin al sia ŝultro, kaj preninte alpobastonon en la manon, ekiris al la montoj.

Survoje el la urbo li preterpasis la malliberejon, kaj enrigardante tra la fenestroj, li vidis Schwartz-on, kiu mem, kun tre melankolia mieno, elrigardis tra ferkrada fenestro.

”Bonan matenon, frato,” diris Hans, ”ĉu vi havas komision por la reĝo de la Ora rivero?”

Schwartz grincigis la dentojn furioze kaj skuis la barojn per sia tuta forto. Sed Hans nur ridis pri li, kaj konsilante, ke li sidu komforte ĝis la reveno de sia frato, remetis la korbon sur la ŝultrojn, skuis la sanktan akvon

ĝis ŝaŭmiĝo rekte antaŭ la vizaĝo de Hans kaj kiel eble plej bonhumore formariĝis.

Tia bela mateno ja feliĉigus iun ajn eĉ sen serĉado de Ora rivero. Kuŝis laŭlonge de la valo longaj linioj el rosa nebuleto, super kiuj leviĝis masivaj montoj kun malsupraj krutaĵoj en palgriza ombro kaj apenaŭ videblaj tra la ŝvebanta vaporeto. Sed laŭgrade ili leviĝis kaj atingis la sunlumon, kiu brilis per akraj ruĝkoloraj punktoj sur la angulaj ŝtonegoj kaj penetris per longaj rektaj radioj tra la franĝoj de lancosimilaj pinoj.

Alte supre montriĝis la ruĝaj splititaj masoj de roko, disfrakasita en miriadoj da fantaziaj formoj, kun strioj de sunlumumita neĝo, ĉi tie kaj tie desegnitaj laŭ la profundegaĵoj, kvazaŭ linioj de fulmo. Pli malproksime kaj tre alte super ĉio, malpli klare ol la matena nuboj, sed pli pure kaj senmove, dormadis sur la blua ĉielo la plej altaj pintoj kun eterna neĝo.

La Ora rivero, devenanta de pli malalta kaj senneĝa altaĵo, estis nun preskaŭ en ombro, escepte de la plej supraj ŝprucaĵoj de ŝaŭmo, kiuj leviĝis kvazaŭ malrapida fumo super la ondoforma linio de la akvofalego kaj forflugis en maldikaj girlandoj kune kun la matenvento.

Al tiu celo, nur al tiu, estis direktitaj la okuloj kaj pensoj de Hans. Forgesante la distancon, kiun li devis trairi, li ekiris neprudente rapide kaj pro tio tre laciĝis, antaŭ ol li suprenrampis la unuan aron da verdaj malaltaj

montejoj. Krome, alveninte sur la supraĵo, li vidis kun surprizo, ke granda glaciejo, pri kiu li tute ne antaŭe sciis, kuŝis inter li kaj la fonto de la Ora rivero.

Suririnte ĝin kun la maltimo de kutimlerta montisto, li tamen opiniis, ke neniam en la vivo li transiris tiel strangan kaj danĝeran glaciejon. La glacio estis treege glitiga, kaj el ĉiuj fendoj venis sovaĝaj sonoj de torente fluanta akvo, ne unutonaj kaj mallaŭtaj, sed ŝanĝantaj kaj bruaj, kiuj pligrandiĝis iufoje kvazaŭ intermitaj kanteroj de sovaĝa melodio. Ili rompiĝis en mallongaj melankoliaj tonoj aŭ subitaj krioj, simile al voĉoj de homoj en malĝojo aŭ doloro.

La glacio estis rompita en milojn da konfuzaj formoj, sed ŝajnis al Hans, ke neniu el tiuj similis la ordinarajn formojn de splitita glacio. Aperis kvazaŭ strangaj esprimoplenaj vizaĝoj en ĉiu konturo, kun senĉesa simileco al vivantaj trajtoj, distordaj kaj mokaj. Miriadoj da trompaj ombraĵoj kaj flamaj lumoj ludis kaj ĉirkaŭe flirtis inter la palbluaj pintoj, blindigante kaj konfuzante la vidon de la vojaĝanto, dum liaj oreloj surdiĝis kaj lia kapo turniĝis pro la ĉiama ŝprucego kaj muĝego de la kaŝitaj akvoj.

Tiuj dolorigaj cirkonstancoj plimultiĝis, dum li antaŭeniris; la glacio krakegis kaj fendiĝis en novaj profundaĵoj ĉe liaj piedoj; falemaj turpintoj balanciĝis ĉirkaŭ li

kaj falis tondrante trans la vojon. Kvankam li ofte antaŭe travivis tiajn danĝerojn sur la plej teruraj glaciejoj kaj dum plej malbona vetero, tamen kun nova kaj sufoka sento de premanta timego li suprensaltis la lastan profundaĵon kaj sin ĵetis, laciĝinte kaj tremante, sur la firman herbaĵon de la monto.

Li jam devis forlasi la korbon da nutraĵo, kiu fariĝis danĝera malhelpaĵo sur la glaciejo, kaj nun li havis nenion por sin refreŝigi kaj devis disrompi kaj manĝi kelkajn pecojn da glacio. Tamen ĝi sensoifigis lin, kaj kun la nevenkebla spirito, kiun havas avareco, li daŭrigis la malfacilan vojaĝon.

Nun lia vojo etendiĝis rekte supre sur montorando de nudaj ruĝaj rokoj sen herbero por helpi la piedon aŭ elstaranta angulaĵo por doni iom da ombro kontraŭ la suda suno. Estis post la tagmezo, kaj la sunradioj forte brilis sur la kruta vojeto, dum la tuta atmosfero estis senmova kaj varmega.

Soifego baldaŭ aldoniĝis al la korpolaĉiĝo, kiu nun dolorigis Hans-on. Ekrigardon post ekrigardo li ĵetis sur la botelon da akvo, kiu pendis ĉe lia zono. "Tri gutoj sufiĉas," li fine pensis, "mi povas almenaŭ malvarmigi miajn lipojn per ĝi."

Li malfermis la botelon kaj ĵus levis ĝin al la lipoj, kiam li ekvidis ion kuŝantan sur la roko flanke de li, kaj



li rimarkis, ke ĝi ekmoviĝas. Estis malgranda hundo, kiu ŝajne agoniis pro soifo. Ĝia lango pendis el la buŝo, ĝiaj makzeloj estis sekaj, ĝiaj kruroj senvive etendiĝis, kaj svarmo da nigraj formikoj rampis ĉirkaŭ ĝiaj lipoj kaj gorgo. Ĝia rigardo trafis la botelon, kiun Hans tenis en la mano. Li levis ĝin, trinkis, forpuŝis la beston per sia piedo, kaj preterpasis. Li ne sciis, kiel okazis, tamen ŝajnis al li, ke trans la blua ĉielo subite venis stranga ombro.

La vojeto fariĝis ĉiumomente pli kruta kaj pli malebena. Anstataŭ refreŝigi lin, la altmonta aero ŝajnis febrigi lian sangon. Li aŭdis kvazaŭ mokadon en la bruo de la montaj akvofaloj; ili estis tre malproksimaj, kaj lia soifo ĉiam pligrandiĝis.

Ankoraŭ alia horo pasis, kaj ree li malsupren rigardis al la botelo ĉe sia flanko. Ĝi estis duone malplena; tamen restis multe pli ol tri gutoj. Li haltis por malfermi ĝin, kaj tuj denove moviĝis io sur la vojeto antaŭ li. Estis bela infano, kuŝanta preskaŭ senviva sur la roko, kun brusto spireganta pro soifo, okuloj malfermitaj kaj lipoj sekegaj kaj febrovarmaj. Seninterese Hans rigardis ĝin, trinkis kaj antaŭen paŝis. Kaj antaŭ la suno venis malluma griza nuboj, kaj longaj, kvazaŭ serpentaj ombroj suprenrampis la montoflankojn.

Kun granda peno Hans ankoraŭ iris. La suno estis malleviĝanta, sed ŝajne nenia malvarmeco venis pro ĝia subiro; la peza senviva aero premegis liajn frunton kaj koron, sed la celo estis proksima. Li vidis la akvofalon de la Ora rivero ŝprucanta el la montoflanko apenaŭ cent kvindek metrojn super li. Haltinte momenton por spiri, li antaŭenkuris por plenumi la taskon.

En tiu momento mallaŭta ekkrio sonis al lia orelo. Li turniĝis kaj vidis grizharan maljunulon kuŝanta sur la rokoj. Liaj okuloj estis interniĝintaj, la vizaĝo morte pala kaj tordita per esprimo malespera.

”Akvon!” li malforte ekkriis kaj etendis la brakojn al Hans.

”Akvon! Mi mortas.”

”Mi havas nenion,” respondis Hans, ”vi jam havis vian porcion da vivo.”

Li paŝis trans la kuŝantan korpon, kaj rapidis antaŭen. El la oriento leviĝis ekbrilo de blua glavoforma fulmo; ĝi tremegis trifoje trans la tutan ĉielon kaj lasis sur ĝi pezantan nepenetreblan nuancon de mallumo. La suno estis subiranta: kvazaŭ varmega bulo ĝi saltis al la horizonto.

La muĝego de la Ora rivero eksonis al la oreloj de Hans. Li staris ĉe la rando de la fendego, tra kiu ĝi fluis. Ĝiajn ondojn plenigis la ruĝa brilo de la sunsubiro; ili skuis siajn krestojn kvazaŭ fajrolangojn; kaj sangolumaj

ekbriloj flirtis sur la ŝaŭmo. Ilia sono ankoraŭ pligrandiĝis ĉe liaj oreloj; lia cerbo turniĝis pro la daŭra tondro.

Tremante pro teruro, li eltiris la botelon el sia zono kaj ĵetis ĝin meze en la torenton. Ĝuste kiam li ĵetis, glacia tremo iris tra lia korpo; li faletis, ekkriegis kaj falis. La akvo fermiĝis super lia krio. Kaj la ĝemado de la rivero pli furioze sonis al la nokta aero, dum ĝi rapidis super la nigra ŝtono.

## Kvara ĉapitro

*Kiel sinjoro Schwartz ekiris por vojaĝo al la Ora rivero, kaj kiamaniere li sukcesis.*

La kompatinda eta Gluck maltrankvile atendis sola en la domo la revenon de Hans. Ĉar li ne revenis, Gluck estis treege timigita kaj iris por rakonti al Schwartz en la malliberejo ĉion, kio okazis. Tiam Schwartz tre ĝojis kaj diris, ke Hans certe fariĝis nigra ŝtono kaj ke li mem havos la oron. Sed Gluck estis tre malgaja kaj ploris la tutan nokton.

Kiam matene li ellitiĝis, estis en la domo neniom da pano nek da mono; tial Gluck iris por dungigi ĉe alia oraĵisto. Li laboris tiel peneme, tiel lerte kaj tiel longatempe ĉiutage, ke li baldaŭ havis sufiĉan monon por pagi la monpunon de sia frato. Irinte tien, li donis ĝin tutan al Schwartz, kiu akiris sian liberecon. Schwartz estis tre kontenta kaj diris, ke Gluck ricevos iom de la oro de la rivero. Sed Gluck nur petis, ke li iru por ekscii, kio okazis al Hans.

Nu, kiam Schwartz aŭdis, ke Hans ŝtelis la sanktan akvon, li pensis en si mem, ke la reĝo de la Ora rivero

eble ne opiniis tion tute korekta, kaj li decidis pli bone aranĝi la aferon. Sekve li prenis iom pli de la mono de Gluck kaj iris al malbona pastro, kiu tre volonte vendis al li iom da sankta akvo.

Tiam Schwartz estis certa pri tio, ke ĉio estas favora; li ellitiĝis frumatene, antaŭ la sunleviĝo, kunportis en korbo iom da pano kaj vino, metis sian sanktan akvon en botelon kaj ekiris al la montoj.

Same kiel sia frato li tre surpriziĝis, vidante la glaciejon, kaj transiris ĝin kun granda malfacileco, eĉ kvankam li lasis la korbon post si. La tago estis sennuba, sed ne brila; etendiĝis sur la ĉielo peza purpura nebuleto, kaj la altaĵoj ŝajnis minacaj kaj malhelaj.

Dum Schwartz suprenrampis la krutan rokan vojeton, soifo dolorigis lin, — kiel jam antaŭe lian fraton, — ĝis li levis la botelon al la lipoj por trinki. Tiam li vidis la beletan infanon kuŝantan apud li sur la rokoj. Ĝi kriis al li kaj ĝemis por akvo.

”Akvo, efektive!” diris Schwartz. ”Mi havas malpli ol duonsufiĉe por mi mem!” kaj li preterpaŝis.

Irante li imagis, ke la sunradioj fariĝas pli malhelaj, kaj li vidis malaltan amason da nigra nubo leviĝanta el la okcidento. Post plua horo da grimrado, soifo ree ekregis lin, kaj li deziris trinki.

Tiam li vidis la maljunulon, kuŝantan sur la vojeto, kaj aŭdis lin ekkrii pro akvo. ”Akvo!” diris Schwartz. ”Mi

havas malpli ol duonsufiĉe por mi mem,” kaj antaŭen li iris.

Denove la lumo ŝajne paliĝis antaŭ liaj okuloj, kaj li rigardis supren: jen sangokolora nebuleto jam venis antaŭ la suno; kaj la amaso da nigra nubo leviĝis tre alten, dum ĝiaj randoj balanciĝis, saltadis kaj disfalis, same kiel ondoj de kolera maro. Ili ĵetis longajn ombrojn, kiuj flugis sur la vojeto antaŭ Schwartz.

Ankoraŭ alian horon Schwartz suprenrampis, kaj ree li soifis; sed ĝuste kiam li levis la botelon al la lipoj, li pensis, ke li vidas antaŭ si la fraton Hans, senforte kuŝantan sur la voĵo. Dum li rigardis, la personaĵo etendis al li la manojn kaj petegis pro akvo.

”Ha, ha!” ridis Schwartz. ”Ĉu vi estas tie? Memoru la ferkradon de la malliberejo, knabo mia! Akvon, efektive! Ĉu vi supozas, ke mi suprenportis ĝin por vi la tutan vojon ĝis ĉi tie?”

Li antaŭen paŝis trans la estaĵon; tamen, dum li iris, ŝajnis al li, ke ĉirkaŭ ĝiaj lipoj aperas stranga moka esprimo. Irinte kelkajn metrojn pli malproksimen, li rigardis malantaŭen, sed la estaĵo ne plu kuŝis tie.

Subita teruro, kies kaŭzon li ne komprenis, kaptis Schwartz-on; sed la deziro je oro venkis lian timon, kaj li rapidegis antaŭen. La amaso da nigra nubo leviĝis al la zenito, kaj el ĝi aperis tordaj ekfulmoj; kaj ondoj de mallumo ŝajnis leviĝi kaj naĝi inter iliaj ekbriloj sur la

tuta ĉielo, kiu similis lagon el sango, kie la suno estis subiranta. Poste blovis el tiu parto de la ĉielo forta vento, disŝirante la ruĝajn nubojn kaj malproksimen disĵetante ilin en la mallumon.

Fine, kiam Schwartz staris apud la kruta bordo de la Ora rivero, ĝiaj ondoj estis nigraj kiel tondronuboj, sed la ŝaŭmo similis fajron. La muĝego de la malsupraj akvoj kaj la supra tondro kuniĝis, kiam li ĵetis la botelon en la fluaĵon.

Dume fulmo ekflamis antaŭ liaj okuloj, la tero disfalis sub li, kaj la akvoj fermiĝis super lia kriego. Sovaĝe eksonis en la nokto la ĝemado de la rivero, rapide ŝprucegante sur du nigraj ŝtonoj.

## Kvina ĉapitro

*Kiel Gluck ekiris por vojaĝo al la Ora rivero, kaj kiamaniere li sukcesis; kune kun aliaj interesaj aferoj.*

**K**iam Gluck sciigis pri tio, ke Schwartz ne revenis, li tre malĝojis kaj ne sciis, kion fari. Havante neniom da mono, li devis iri denove por dungigi al la oraĵisto, kiu forte laborigis lin kaj pagis al li tre malmultan monon.

Tial Gluck laciĝis post unu aŭ du monatoj kaj decidis iri por provi sian sorton je la Ora rivero. "La eta reĝo havis tre bonkoran aspekton," li meditis, "mi opinias, ke li ne faros el mi nigran ŝtonon."

Sekve li iris al pastro, kiu donis al li iom da sankta akvo, tuj kiam li petis ĝin. Poste, metinte iom da pano en sian korbon kaj la botelon da akvo, Gluck ekiris tre frue al la montoj.

La glaciejo, kiu laciĝis liajn fratojn, estis dudekoble pli malfacila por li, ĉar li estis nek same forta nek same kutimlerta sur la montoj. Kelkfoje li danĝere falis; li perdis la korbon kun pano kaj estis tre timigata de la strangaj bruoj sub la glacio. Post la transiro li kuŝis longtempe



sur la herbo por ripozi, kaj li komencis suprenrampi la monton, ĝuste kiam la tago estis plej varma.

Post unu horo da rampado li treege soifis kaj volis ĵus trinki, kiel la fratoj, kiam li vidis maljunulon malsuprenvenantan la superan vojeton. Li ŝajnis tre malforta kaj sin apogis sur bastono.

”Mia filo,” diris la maljunulo, ”mi svenas pro soifo, donu al mi iom da tiu akvo.” Gluck rigardis lin kaj vidante, ke li estas pala kaj lacega, donis al li la akvon.

”Mi nur petas, ne trinku ĉion,” diris Gluck.

Sed la maljunulo multe trinkis kaj redonis al li la botelon du-trione malplenigita. Poste li deziris bonan sorton al Gluck, kaj ĉi tiu denove antaŭeniris. La vojo plifaciliĝis por liaj piedoj, du aŭ tri herbofolioj vidiĝis sur ĝi, kelkaj cikadoj komencis kanti sur la apuda teraso, kaj Gluck opiniis, ke li neniam antaŭe aŭdis tiel gajan kantadon.

Alian horon li ankoraŭ iris kaj tiel soifegis, ke ŝajnis al li neeble ne trinki. Sed ĝuste kiam li levis la botelon, li vidis malgrandan infanon, kiu kuŝis spiregante apud la vojoflanko kaj kriis kompatinde pro akvo. Gluck pense batalis en si kaj decidis elporti la soifon iom pli longe. Li metis la botelon al la lipoj de la infano, kiu trinkis la reston de la akvo escepte de malmultaj gutoj.

Tuj la infano ridetis al li, stariĝis kaj malsupren kuris laŭ la monto; kaj Gluck postrigardis, ĝis kiam ĝi tiel mal-

grandiĝis kiel steleto; tiam turniĝante, li ree komencis supreniri.

Nun estis ĉiuspecaj ĉarmaj floroj kreskantaj sur la rokoj, hela verda musko kun palaj rozruĝaj stelaj floroj, kaj delikataj sonorilformaj gencianoj pli bluaj ol la plej profunda ĉielo, kaj pure blankaj diafanaj lilioj. Karmezinaj kaj purpuraj papilioj flugis ĉi tien kaj tien, kaj la ĉielo malsupren sendis tiel puran lumon, ke Gluck neniam en la vivo estis pli feliĉa.

Tamen post alia horo da grimpado la soifo ree fariĝis netolerebla. Gluck rigardis la botelon kaj vidis nur kvin aŭ ses gutojn tie restantajn; li ne povus permesi al si trinkon.

Dum li alkroĉis la botelon ree ĉe la zono, li vidis hundeton kuŝantan sur la rokoj, spasme penantan spiri, ĝuste kiel Hans ĝin vidis la tagon de sia supreniro. Gluck haltis kaj rigardis unue la hundon kaj poste la Oran riveron malpli ol kvincent metrojn super si. Li rememoris la vortojn de la nano, "ke neniu povos sukcesi, escepte en sia unua provo," kaj penis pasi la hundon, sed ĝi kompatinde bleketis, kaj Gluck ree haltis. "Malfeliĉa besto, ĝi estos mortinta antaŭ mia reveno, se mi ne helpos ĝin."

Tiam li pli kaj pli proksime rigardis ĝin, dum ĝiaj okuloj lin alrigardis tiel malgaje, ke li ne povis tion toleri. "Peston al la reĝo kaj ankaŭ al lia oro!" ekkriis Gluck,

malfermante la botelon kaj verŝante la reston de la akvo en la buŝon de la hundo.

Tuj la hundo suprensaltis kaj staris sur la postaj kruroj. Ĝia vosto malaperis; la oreloj fariĝis longaj, pli longaj, silkecaj, oraj; la nazo tre ruĝiĝis, la okuloj gaje palpebrumis, kaj jen staris antaŭ Gluck lia malnova konato: la reĝo de la Ora rivero.

”Dankon al vi,” diris la monarĥo, ”sed ne timu, ĉio estas kontentiga,” ĉar Gluck montris evidentajn signojn de konsterno pri la neatendita respondo al sia lasta diro.

”Kial vi ne antaŭe venis,” daŭrigis la nano, ”anstataŭ sendi al mi tiujn friponojn, viajn fratojn, por doni al mi la laboron fari el ili ŝtonojn? Tre malmolaj ŝtonoj ili ja fariĝis.”

”Ho ve!” ekkriis Gluck, ”ĉu vi estis vere tiel kruela?”

”Kruela!” respondis la nano, ”ili verŝis malsanktan akvon en mian fluaĵon. Ĉu vi supozas, ke mi permesas tion?”

”Sed,” diris Gluck, ”mi estas certa, sinjoro — via reĝa moŝto, mi intencis diri — ke ili ricevis la akvon el la preĝeja sanktakvujo.”

”Tre kredeble,” respondis la nano, ”sed,” — kaj lia vizaĝo fariĝis severa, — ”la akvo, kiun oni rifuzis je la krioj de la laceguloj kaj mortantoj, estas nesankta, eĉ se ĉiu sanktulo en la ĉielo benus ĝin; kaj la akvo, kiun oni

trovas en la fonto de kompato, estas sankta, kvankam ĝi eble estas malpurigita per kadavroj.”

Tiel parolante, la nano klinis sin kaj deŝiris lilion, kiu kreskis ĉe liaj piedoj. Sur ĝiaj blankaj folioj pendis tri gutoj da hela roso. La nano skuis ilin en la botelon, kiun Gluck tenis en la mano.

”Ĵetu tiujn en la riveron,” li diris, ”kaj malsupreniru laŭ la alia flanko de la montoj en la Valon de trezoro. Kaj bonan sorton al vi!”

La figuro de la nano malklariĝis, dum li parolis. La ŝanĝemaj koloroj de lia robo formis prisman nebuleton de luma roso; li staris momenton vualita per tiuj koloroj kvazaŭ per la zono de larĝa ĉielarko. La koloroj paliĝis, la nebuleto leviĝis en la aeron, kaj jen la monarĥo elvaporigis.

Gluck suprenrampis al la bordo de la Ora rivero, kies ondoj estis klaraj kiel kristalo kaj brilaj kiel la suno. Kiam li ĵetis la tri gutojn da roso en la riveron, formiĝis malgranda ronda turnakvo, en kiun la akvo malsuprenfluis kun muzika bruo.

Gluck staris kelkatempe, rigardante ĝin tre malgaje, ĉar la rivero ne fariĝis oro, sed ĝia akvo eĉ ŝajnis malmultiĝi. Tamen li obeis sian amikon, la nanon, kaj malsupreniris la alian flankon de la monto, al la Valo de trezoro.

Irante li imagis, ke li aŭdas la bruon de akvo penetranta en teron, kaj kiam li alvenis tie, kie li povis vidi la Valon de trezoro, jen alia rivero simila al la Ora rivero elfluis el nova fendo en la rokoj trans ĝin kaj pasis en sennombraj fluoj inter la sekaj amasoj de la ruĝa sablo.

Dum Gluck rigardis, freŝa herbo ekkreskis flanke de la novaj riveretoj, kaj rampaj kreskaĵoj grimpis sur la malsekiĝanta tero. Novaj floroj subite ekfloris sur la riverbordoj, same kiel steloj ekmontriĝas, kiam la krepusko malheliĝas; mirtaj boskoj kaj vinberujoj faris ombron sur la valo, dum ili kreskis.

Tiamaniere la Valo de trezoro ree fariĝis ĝardeno, kaj la heredaĵo, kiu perdiĝis pro krueleco, estis regajnlita per amo.

Gluck iris loĝi en la valo kaj neniam forpelis malriĉulojn de sia pordo. Sekve liaj grenejoj fariĝis plenaj, kaj lia domo pleniĝis per trezoroj. Por li la rivero fariĝis Rivero ora, laŭ la promeso de la nano.

Ankoraŭ nun la loĝantoj de la valo montras la lokon, kie li ĵetis la tri gutojn da sankta roso en la riveron, kaj klarigas la subteran direkton de la Ora rivero, ĝis kie ĝi eliras en la Valon de trezoro. Kaj ĉe la supraĵo de la akvofalo de la Ora rivero oni ankoraŭ povas vidi la du nigrajn ŝtonojn, ĉirkaŭ kiuj la akvo malĝoje muĝas ĉiutage je sunsubiro. Ĉi tiujn ŝtonojn la homoj de la valo ankoraŭ nomas la Nigrajn fratojn.

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

ISBN 91-7303-179-8